Rainer Maria Rilke,

# Herbst

Die Blätter fallen, fallen wie von weit,
als welkten in den Himmeln ferne Gärten;
sie fallen mit verneinender Gebärde.
Und in den Nächten fällt die schwere Erde
aus allen Sternen in die Einsamkeit.

Wir alle fallen. Diese Hand da fällt.
Und sieh dir andre an: es ist in allen.
Und doch ist Einer, welcher dieses Fallen
unendlich sanft in seinen Händen hält.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Rainer Maria Rilke *(Rajnero Mario Rilko, ∗1875-12-04 – †1926-12-29).*

*Arg-773-1549 (2013-01-16 22:31:11)*

Rainer Maria Rilke,

# Aŭtuno

*tradukita de Cezar*

Folioj falas iel el la for',
jen kvazaŭ velkus en ĉiel' ĝardenoj.
Faladas ili kun neanta gesto.
Kaj nokte sinkas peza ter' sen resto
el ĉiuj steloj al solec' en hor'.

Ni ĉiuj falas. Jen ĉi man' dum fal'.
Aliajn vidu, samas ja ĉe ĉiu.
Kaj tamen estas iu, tenas tiu
tenere ĉion softe dum la fal'.

*Traduko de la Germana poemo "Herbst" de* Rainer Maria Rilke *(Rajnero Mario Rilko, ∗1875-12-04 – †1926-12-29) en Esperanton de* Cezar *(civila nomo: Hans-Georg Kaiser, ∗1954-05-21).*

*Arg-773-2256 (2015-01-22 12:16:31)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en* http://www.ipernity.com/blog/cezar/605953.

Rainer Maria Rilke,

# Aŭtuno

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Folioj kvazaŭ el la malproksim'
- ĉu velkas enĉiele jen ĝardenoj? -
faladas kun gestad' neanta;
la peza Tero estas subiĝanta
en la solecon el stelarsenlim'.

Ne estas en la mondo viv' sen fin'.
Ja falas ĉiu mano. Tamen sciu,
ke regas super ĉio Iu, kiu
en Sia man' mildege tenas nin.

*Traduko de la Germana poemo "Herbst" de* Rainer Maria Rilke *(Rajnero Mario Rilko, ∗1875-12-04 – †1926-12-29) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1996-09-26.*

*MR-287-1 / Arg-773-1550 (2014-11-06 13:16:30)*